

Kiajn servojn la esperanto-instruado povos alporti al tiu
de la franca lingvo por franclingvaj gelernantoj, 7-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 652, 1976.04.07 & 10

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

En nia prelegaro pri la peresperanta instruado de la nacia lingvo, ni hodiaŭ pritraktos la temon tradukado.

A.- La pasintan semajnon, preninte kiel ekzemplon la fablon **Leona divido** de **Kolomano Kalocsay**, ni montris la vicon da prepar-laboroj, kiuj devas nepre enkonduki la traduk-momenton.

Cl.- Unue devas disvolviĝi leksika studo de la tradukota teksto. Tiu ĉi ekzerco malkovrigis ekzemple, ke kvinono de la vortoj de la fablo **Leona divido** estas derivaĵoj. Helpe de la vortaro PIV aŭ Plena Vortaro la gelernantoj devis noti la ekzaktan signifon de la radikoj kaj de ties derivaĵoj.

A.- Sekvis demandaro koncerne la tekston mem, al kiu la gelernantoj respondis unue kolektive kaj parole, poste individue kaj skribe. Tiu ĉi ekzerco estas nepre necesa.

Cl.- Fine la tradukota teksto estas parkerita, unue helpe de kolektivaj ekzercoj, poste per individua lernado.

A.- La traduklaboron devas enkonduki silenta momento, dum kiu ĉiu refoje legas la tradukotan tekston provante mense jam efektiviĝi la nacilingvan verkadon. Tiam malkovriĝas la malfacilaj eroj de la teksto. La silenton rompas la gelernantoj, kiuj renkontas malfacilaĵon. Sed ne tradukon ili rajtas demandi. En esperanto ili devas informiĝi pri la nebulaĵoj. En esperanto respondas la gekamaradoj, kaj se necese la instruisto. Kiam fine revenis silento, tiam estas la momento transiri al la traduko mem. Ĉiu infano laboras individue.

Cl.- En nia eksperimenta instruado de esperanto ni povis konstati, ke la gelernantoj dividiĝas laŭ du grupoj, kiujn ni karakterizos per la vortoj er-ig-em-uloj kaj tut-emuloj.

A.- La erigemuloj ŝatas alfronti la tekston eron post ero, kaj ili antaŭeniras, nur kiam ili kapablis solvi la ĝistieajn erojn. Ĝenerale ili laboras samtempe sur provfolio kaj sur la kajero. Eron post ero, kiam ili trovis kontentigan solvon, ili ĝin belskribas en la kajero. Kiam ili alvenas al la finpunkto, ili relegas la tradukaĵon kaj malofte plibonigas ĝin.

Cl.- La tutemuloj agas tute alimaniere. Ili ĝenerale uzas multe da papero. Ĝenerale tre rapide ili verkas unuan tradukaĵon, kaj poste ili senfine korektas kaj rekopias ĝin. Eĉ por malgrava korekto ili rekopias la tuton, kiel se ili ne povus akcepti prijuĝi tekston kun korektoj. Kaj finfine ili belskribas la tradukaĵon en la kajero.

A.- La laboro de la erigemuloj ne necese estas pli rapida ol tiu de la tutemuloj. Ĉar ili povas panei dum longaj momentoj antaŭ nesolvita problemeto, dum la tutemuloj saltas la malfacilajn punktojn profite al unua solvo de la pli facilaj. Ĝenerale la knabinoj preferas la erigan labormetodon, dum la knaboj estas pli tutemaj. La samon cetere oni rimarkas en matematiko kaj en multaj fakoj.

Cl.- Ŝajnas al mi, ke la tasko de la lernejo estas konduki la gelernantojn al meza labormetodo. Al la erigemuloj oni devas instrui antaŭeniri en la traduklaboro, eĉ se problemoj ne trovis tujan taŭgan respondon. Tiujn ĉi problemojn ili lernu reekzameni poste. Al la tutemuloj estas malpli facile doni labortechnikon. Tamen ili lernu ne konstante reskribi sian tekston. Ili akceptu daŭrigi la laboron, eĉ helpe de tradukaĵo kun plibonigoj.

A.- Por reveni al tiuj ĉi du tipoj da gelernantoj, mi ricevis la impreson, ke la erigemuloj pli ŝatas skribi traduki, ol parole traduki, kaj ke estas la inverso por la tutemuloj. La unuaj ŝatas traduki, la duaj interpreti. Estas fakto, ke en la internaciaj organizaĵoj la plimulto de la interpretistoj estas viroj, dum por la tradukado plimultas la inoj.

Cl.- Kiam ĉiu lernanto estas liverinta sian tradukaĵon, alvenas la momento ilin kompari. Estas grave, ke ĉiu havu sub la okuloj la propran tradukaĵon. Frazon post frazo oni komparas tiujn ĉi solvojn kaj alvenas al komuna teksto, kiun oni skribas sur la nigra tabulo. Oni klarigas, kial solvo estas pli bona ol alia, sin bazante sur kelkaj kriterioj : fideleco al la originalaĵo, stilo, leksika kaj gramatika korekteco, respekto de la tono, de la formo, ktp.

A.- Fine ĉiu lernanto belkopias apud sia tradukaĵo la komunan tekston. Kaj, kio estas ege grava, ĉiuj mem juĝas, ĉu la propra tradukaĵo estis bona, tio signifas sufiĉe simila al la komuna solvo, meza, aŭ malkontentiga. Estas interese konstati, ke la gelernantoj sufiĉe objekte juĝas la propran laboron, dum multe malpli facile ili akceptas la juĝon de ceteruloj, kiel ekzemple tiun de la instruisto. Pro tio la pertraduka instruado de la verkado en la nacia lingvo, se ĝi baziĝas sur facile asimilebla lingvo kiel esperanto, estas pli ŝatata de la gelernantoj, ol la verk-instruado tradicia, kies juĝkriterioj restas subjektive ligitaj al la karaktero kaj emoj de la instruisto.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!